In the evening 35 students in **Greenock** showed that they were very much alive, and the same keenness was observable at a meeting of the **Paisley** group the next evening. For the 24th the group in **Buckhaven** and **Methil** had called a meeting at a local school, and distributed a number of handbills to advertise it. The Provosts of Leven and Buckhaven both attended this meeting, as also a wonderful supper given by the members at the house of a local Councillor. The Scottish Congress will meet here in 1934, and the group deserves the honour. After a visit to our pioneer,

Mr. Lawson, in **Aberdeen**, we went on the 26th to **Carnwath**. Here Mrs. Elder hopes to hold a class next Autumn. At a gathering in Crosscrae Vicarage, **Kendal**, on the 27th, we rejoiced to hear fluent Esperanto spoken even in this Esperanto desert, and to know that here also there is now a prospect of a forward move. At the Friends' meeting at **Bishop Auckland** on Sunday evening 50 attenders considered the claims of Esperanto. The next day talks were given to 100 boys in the Grammar School (some had already begun to learn), and to four separate classes at the Girls' County School, where one felt oneself to be in Esperanto land. In the evening a visit was paid to **South Shields**, and on the 30th to friends in **Wellingborough** and visitors from neighbouring towns.

Names are intentionally omitted from this report. It would be impossible to name all whose steady and devoted work is an inspiration to those who know them, and to mention some names only would be invidious. Will those who gave us hospitality and welcome please accept very grateful thanks. Everywhere we received kindnesses which will be happy memories for the rest of our lives. We hope that the visits paid will prove helpful to the movement.

It is a pity that meetings could not be arranged with the groups in Aberdeen, Dundee, Burntisland, St. Andrew's, Perth, Glasgow, and Partick, but we did all that was possible. Altogether, in the 17 days, 2,040 miles were covered, and 27 lectures were given.

M. C. B.

A Request.—"As I propose writing a book about my 30 years' experiences as an Esperantist, I should be glad if any reader would recall to my mind any incident in which I was personally concerned which struck him as being particularly interesting, and more especially if of an amusing kind."—J. Merchant, 13 Hartington Rd., Sheffield.

Esperanto kaj la franca parlamento.—S-ro M. Rolland, Deputito de la departamento Rhône, jus starigis Esperantan grupon ĉe la Ĉambro de Deputitoj de la Franca Parlamento, al kiu jam aliĝis 41 deputitoj el ĉiuj partioj.

OUR BOOKSHELF

Books starred are stocked by the B.E.A. Others should be ordered not from the B.E.A., but from the address given.

POSTAGE EXTRA.

***Merkado la Azenpelisto.** — *Naum Jerušalmi. Romano. El la hebrea trad. Leono Vienano. 140 paĝoj., tole bindita, 5\$.*

Kiu volas legi vivplenan romanon pri dummilita Palestino? Kiu volas lerni pri la (niaopinie) strangaj moroj de l' hebrea popolo, ĝis nun malmulte konata en Esp. literaturo? Kiu volas ĝui belan, fluan, klasikan stilon, preskaŭ sen neologismoj, sen komplikaj parolturnoj? Jen por li vera ĉielsendaĵo!

Se ĉe tiel poezia, infane kortuſa rakonto eblas citi partojn el la tuto, plej plaĉas la priskriboj de la soleca, mistera, palestina nokto, tra kiu pelas sian paciencan azenon la juna Merkado.

Laŭ malnova Esperantuja tradicio jen kelkaj gramatikaj kritiketoj, eĉ en verko ĉi tiel supernormale senerara: la uzo de *unika* kun senco de *sola*; *tie kaj ie* anst. la ordinara *tie kaj tie*; la oftega staro de l'verbo kape de frazo; *se ne la bastonego* anst. *sen . . .* Ĉu *urĝi* estas transitiva? Kion signifas *laŭ la ordonoj de supre devis . . .*? Sed sufiĉas flankaj kritiketoj!

Kompletigas ĉi tiun belliteraturan juvelon mallongaj komentoj kaj aŭtora memhistorio.

B. P.-H.

***Hungara Antologio.** — *Redaktis K. Kalocsay. Kunlaboris J. Baghy, K. Bodó, L. Halka, F. Szilágyi, L. Totsche. Enkondukon verkis Miháel Babits. Poemoj kaj noveloj de 50 hungaraj verkistoj. 472 tekstopaĝoj kaj 24 kliſopagaĵoj, kun la fotoj de 47 verkistoj. Sen ligna papero, multkolora kovrilo. 16\$., aŭ havebla prefere kaj pli malkare per aligo al A.E.L.A. (prospekto ĉe B.E.A.).*

En sia antaŭparolo Kalocsay klarigas, ke li "rezignis pri la kompleteco, por doni prefere interesan legaĵon." Tiumente mankas al la volumo prozaĵoj el la malnova literaturo; mankas ankaŭ verkoj de la novgeneraciaj aŭtoroj, ankoraŭ ne plene elprovitaj. Por ke la leganto tamen ne malhavu ĝustproporcian trarigardon de la tuta hungara literaturo, Babits, kompetanta kaj klarvida kritikisto, skizas sur 15 paĝoj

gian evoluon de la tempo en kiu ekfloris Bálint Balassa, la hungara Villon, ĝis la nova revolucio skolo gvidata de Endre Ady.

Rilatigante la literaturan disvolviĝon de Hungarujo al la historiaj faktoroj ĝin influintaj, Babits atentigas, ke la orienta lingvo hungara kuniĝis kun okcidenta kulturo por formi amalgamon, kiu ĉerpas sian forton el ambaŭ siaj elementoj; samtempe li skribas: *la hungara kulturo ne estas fremda al la eŭropa kulturo, sed ĝi estas ĝia spegulbildo en la spegulo de alispeca animo.* Helpi al la ekkono kaj kompreno de la animoj de aliaj homoj—ĝuste ĉi tion devus celi ĉia serioza literaturo; kaj ĉar ĉi tiu libro atingas tiun celon, tial ĝin devas legi ĉiu, kiu volas koni pli intime la animon de la hungara popolo.

Kiu tiumaniere konatiĝos la unuan fojon kun la literaturo de Hungarujo, tiu nepre ricevos la impreson, ke ĝi staras sur ne malpli alta nivelo ol la literaturoj pli vaste konataj. Ĉu ekzistas nacio, kiu ne fierus posedi iujn poemojn de Sándor Petöfi, Mihály Vörösmarty, kaj Endre Ady, kaj la novelojn *Malriĉaj homoj* (Zsigmond Móricz), *La tri fraternoj Tündérlaki* (Jenő Heltai), *La sama en viro* (Frigyes Karinthy), kaj *La unua paſo* (Ferenc Molnár)?

Pri eldonajo de *Literatura Mondo* redaktita de Kalocsay estas kompreneble, ke la lingvajo de la tradukoj estas ĉiel aprobinda; la plimulton el la kvindedk neologismoj klarigitaj ĉe la fino de la libro oni jam aliloke uzis, do ili ne ĝenos la harditajn legantojn de niaj modernaj verkoj.

Entute mi varme rekomendas ĉi tiun antologion, kaj kiel montró-fenestron de hungara literaturo, kaj kiel ateston pri la ĝeneralaj plialtiĝo de la literaturaj postuloj de la esperantistaro.

ALEC VENTURE.

***Krestomatio** (*Eenvoudig Leesboek der Wereld hulptaal Esperanto*).—*Kompilita de H. J. Builthuis. 300 pp., 11\$.*

Jen legolibro modela, lukse eldonita, kaj al tiu, kiun ne timigas la prokurze alta kosto, ĉiel rekomendinda. Oni trovos en ĝi ne disajn fragmentojn, sed tutajn ĉapitrojn el tre diversaj verkoj diversnaciaj. Tio permesas, ke oni juĝu pri la stilo de niaj plej bonaj aŭtoroj—jen en traduko jen en originalo. Interalie oni trovos en ĝi multon jam de longe ne haveblan.

La Liberecana Socio.—G. Bastjen.
Trad. de A. Ozre. S.A.T., 23 rue Boyer, Paris 20. 50 pp., 0.60 gmk.

Studinda brošuro pri la sociaj ideoj de la anarkistoj, entute interesa kaj bone verkita. Tamen ne plaĉas la formoj *aliu, aliel, k.s.* Pri la enhavo oni kompreneble povas diversmaniere opinii, sed ĝi sendube instigos al pripenso.

Por mi la argumentoj ne estas konvinkaj: en la liberecana socio ŝajne mankas unu gravega afero—la disciplino; kaj se Aleksandro ne volas labori . . . ?

Tamen neniu progresemulo kontraŭos la finan admonon. *Ciufoje, kiam ni povos malpliigi la malbonon, alproximiĝi al la bono, . . . ni tion faru. Ciufoje, kiam ni povos helpi al plialtigo intelekta, morala, kaj materia de la popolo, . . . ni ne hezitu, ni agu.*”

W. SEVERN.

***Gvidilo tra la Esperanto-Movado.**—G. P. De Bruin. S.A.T. 48 pp., 1s.

Duono de ĉi tiu verketo pleniĝas per ĉapitroj pri la “laborista” parto de nia movado, kaj pro tio la enhavo estas aparte interesa por tiu sekcio de l’ Esperantistaro; sed al ĉiu adepto de la lingvo la brošuro entute prezentas utilan kaj bone aranĝitan resumon de historio kaj aktuala. Koncizaj paragrafoj, kun multaj datoj kaj detaloj, ĝin karakterizas, kaj pro la malgranda kosto ĝi estas ne nur havinda, sed havebla. Mi sugestas, ke en estonta eldono oni uzu pli da kursivo en la paragrafoj pri literaturo, ĉar en la nuna formo ne ĉiam estas facile (almenaŭ por novaj adepto) distingi inter aŭtoroj kaj iliaj verkoj. Ankaŭ, oni aliigu la vortojn sur paĝo 11, kiuj povus kredigi, ke nur malgranda frakcio de l’ aligintaro efektive ĉeestas niajn kongresojn. (Eĉ la laborkunsidojn ĉeestas entute pli ol la nombro ĉi tie citita, ĉar tre ofte iuj ĉeestas unu tian kunsidon, kaj aliaj alian).

VERDANO.

Esperantisk-Svensk Ordbok.—Akademiano Paul Nylén, 232 pp., 3.75 kr. Förlagsföreningen Esperanto u.p.a., Stockholm.

Jen dense presita kaj ĉiel modela kaj praktika vortaro, verkita de la plej eminenta sveda Esperantisto. Ĝi sendube estos helpilo netakseble valora por la sveda Esperantistaro. Alilingvaj samideanoj ankaŭ trovos ĝin tre konsultinda.

MOVADO FAKA

Skolta.—En *The Guide* ĉiumonate aperas Esperanta leciono el la plumo de F.-ino Goldsmith. La kurso estas simpla kaj praktika, kaj vekis multe da intereson por nia afero.

On July 1 and 8, the S. Kensington Guide Esperanto Class will arrange elementary Esperanto tracks, followed by Rounders’ Tournaments. All guide Esperantists in uniform, including beginners, are invited to take part. Meet at Albert Memorial, 2.30, weather permitting, with tea if required, and a paper carrier bag per person.

Turisma.—La oficialaj gvidlibroj de **Malo les Bains** kaj **Dunkerque** en Francujo enhavas paĝon en Esperanto. La Komerca Ĉambro de **Orleans** (Place du Martroi), eldonis flugfolion kvar-paĝan: *Kion la provinco Orleanais povas liveri al vi.* De Verkehrsverein, Bingen/Rhein, Germanujo, ni ricevis belan ilustritan prospekton en Esperanto pri la urbo **Bingen**. Petu senpagan ekzempleron. El **Danujo** venas dek-paĝa flugfolio *Kopenhago, la urbo de la belaj turoj*: riĉe ilustrita, kaj eldonita de Turistforeningen for Danmark, Vestra Boulevard 18, Kopenhago V. “Verda Stelo” vojaĝoficejo, Dob-u 90 III, Budapest, liveras informojn pri vojaĝado en **Hungarujo**. La Komerca Ĉambro de **Boulogne sur Mer** eldonis cirkuleron en Esperanto por diskonigi la havenon tutmonde.

VARIA

The Jubilee Congress, August, 1933. It is now certain that this will take place in Cologne, as previously announced. Intending members should book without delay, as otherwise it will be difficult to arrange accommodation. Details of the B.E.A. party will be found on page iii. of our cover. According to information received from the German Esperanto Association, no Esperantist need hesitate to attend.

Cseh courses (perfektiga 23–29 Jul.), Komenca (7–17 Aug.), Instruista (7–17 Aug.), will be held at Arnhem at the dates mentioned. Full particulars from Int. Cseh-Instituto, 32 Oostduinlaan, Hague.

“**Esperanto-Roman-Gazeto**” is the title of a proposed fortnightly. Write for specimen copy and details to F. Ellersiek, 5 Wilmsstr., Berlin, S.W.61.

MOVADO GRUPA, LOKA

Accrington.—Sek., L. Birtwistle, 125 Blackburn Rd., Clayton-le-Moors (nova adres).

Birmingham.—Je 3.30, 26 Junio, en Cafe Royal, Union St., S-ro S. Pragano prelegos pri Rumanujo.

Brighton.—Nova kunvenejo : 1-a kaj 3-a mardoj, "Glenholme," Woodruffe Avenue (lower end), Hove.

Chesterfield.—Nova Sek., F-ino I. Ashwood, 10 Boythorpe Rd.

East Midland Federation.—Vagado : 22 Julio, al Newstead Abbey (enirejo 3.15). Konferenco : 30 Sept., Burton-on-Trent.

Liverpool.—De Oktobro oni kunvenos en pli oportuna ĉambro, 22 Upper Duke St., kontraŭ Rodney St. Intertempe la sabata kaj merkreda vagado daŭre okazas.

London Club (47 Bedford Row, W.C.1).—Jul. 1, ekskursio al Kew. (Ankaŭ ekskursio al Dunkerque). 4, El la ĉapelo. 7, Esperanta Literaturo. 11, Elektitaj tekstoj. 14, Imita proceso. 18, Marksismo kaj Lingvoscienco. 21, Kantado. 25, Esperanta versfarado. 28, Gazeta vespero. *Vagadoj* : Jul. 9, 16, kaj 30.

London : Diservo en Esperanto okazos Jul. 9 je 3.15, en preĝejo St. Ethelburga, 72 Bishopsgate. Solkantos F-ino R. Sales.

London : North (Adult School Hall, Commerce Rd., N. 22).—Jul. 7, Malproksimaj amikoj. 14, Ĉu sidloko en omnibuso estas pli dezirinda, ol rideto de ĉarmulino plus vojaĝo stara? 21, La Unua de Majo en Sovetunio.

London : West.—Ĉe la Koopera Internacia Festo en Southall Park, Sabato, 1 Julio, estos budo Esperanta. S-ro S. B. Hocking, 46 Woodfield Crescent, W.5, petas proponojn de helpo.

Plymouth.—Nova Sek., S. R. Hawkins, 27 Union St., Stonehouse.

Southend.—Sek., Miss Cox, 263 Southbourne Grove, Westcliff-on-Sea.

MORTOJ

Giles.—Je 8 Majo, Alban Giles, en Newport, Shropshire.

Hawkes.—Je 12 Junio, 1932, Pastro J. H. Hawkes, Remeura, Auckland, New Zealand.

Phillimore.—Je 7 Majo, 83-jara, S-ino Phillimore, edzino de nia membro S-ro W. Phillimore, en 66 Earlsfield Road, London, S.W.18.

Wright.—Je 12 Majo, Thomas Wright, 86-jara, en Turvey, Beds.

OFFICIAL NOTICES

FILIAJ GRUPOJ.

Auckland, New Zealand : Sek., C. Brandon, 16 Wairiki Rd., Mt. Eden, Auckland.
Perth, Scotland : Sek., B. Young, 53 Glasgow Rd., Perth.

DELEGITA KONSILANTO

Southend : F-ino Moxon.

KANDIDATOJ POR MEMBRECO

Ashmore, Thomas	Edinburgh.
Blackett, James F.	Bath.
Cruickshank, Doreen M.	Oxford.
Forbes, S-ino J. Malcolm	Milton, Mass., U.S.A.
Gardner, Ronald S.	Harrogate.
Hanratty, Walter P.	London, S.E.25.
May, Lionel H.	Weston-super-Mare.
Naylor, Sam	Agra, U.P., India.
Pugmire, Sydney	Liverpool.
Shaw, Arthur J.	Westcliff-on-Sea.
Shaw, S-ino Jessie M.	Westcliff-on-Sea.
Tippetts, Ronald A.	Bristol.
Willcox, Alec	Dawlish.

DONACOJ AL B.E.A.

Brighton Esp. Soc., 10/-; C. W. Morecroft, 2/-.
Kapitala (50,000 shilings) Kaso.—S. P. Marks, 1/-; R. Paul, 1/-.

NOVAJ DELEGITOJ

Wrexham : G. Bevan.

Portsmouth : W. H. Bow.

GARANTIA KASO, 1933

	£	s.	d.
Antaŭa sumo	..	309	0 0
Aston, Miss P., Barnstaple	..	0	10 0
Bishop, Miss H., Hunstanton	..	0	5 0
Briggs, Miss L., Leeds	..	0	10 0
Hill, Clement, St. Leonards	..	1	0 0
Howlett, Miss A. B., Bushey	..	0	10 0
Kennedy, D., Glasgow	..	1	0 0
Leakey, J., Hatfield	..	5	0 0
Mitchell, Miss E. R., Eastbourne	..	1	0 0
Petrie, C. J., Burton-on-Trent	..	0	5 0
Pointer, Mrs. M., St. Neots	..	0	10 0
Robertson, A. W., Rochdale	..	0	10 0
Todd, W., Gyöngyös, Hungary	..	0	5 0
Walker, Mrs. C. M., Darvel	..	0	10 0
Yates, A., Cheltenham	..	0	10 0
Sumo (bezonata : £500)	..	£321	5 0

SUKCESINTOJ

Licenciata Ekzameno (L.B.E.A.)

Brian Price-Heywood, *Formby*; *Alec Venture, *Mitcham*.

Supera Ekzameno (D.B.E.A.)

Edward M. Sugar, *Manchester*; Leslie C. Cook, *Kenneth G. Linton, *Salvadore Culell, Melbourne*.

Elementa Ekzameno

Mrs. Frances M. Anderton, Edward H. Derbyshire, *Nora C. Giles, *Southport*; *Edith Barker, *Lower Broughton*; Walter Sisson, *Blackley*; Kathleen M. Johnson, *Leyton*; *Frank Dalton, *Eleanor F. Dalton, *Mrs. Nora Holmes, *Leytonstone*; Samuel B. Goddard, *Woodford Green*; H. Mowatt, *Belleville, Ontario*.

Steleto montras sukceson kun honoro.

LA PIRATO

Kajeroj por Satiro, Humoro, kaj Libereco . . . relativa
aperas ĉiumonate sur 16 paĝoj.

Sipestro : RAYMOND SCHWARTZ.

Hejma Haveno : PARIZO, 9 RUE HALLÉ, XIV.

Abonprezo por unu jaro (12 numeroj)	4/6
Specimenekzemplero kontraŭ	5d.

MENDU TUI ČE

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION, INC.
142, HIGH HOLBORN, LONDON, W.C.1.

Owing to an advantageous purchase, we are now able to supply

RUMANA BONHUMORO

By P. FIRU AND SIGISMUND PRAGANO.

at the reduced price of 2/- in paper and 3/- in cloth. Postage 2d.

BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION,
142, HIGH HOLBORN, LONDON, W.C.1.

AN EXCELLENT BIRTHDAY PRESENT

FOR ESPERANTIST OR NON-ESPERANTIST.

IF YOU WANT A GOOD JIG-SAW
YOU MUST HAVE OUR NEW

ESPERANTO JIG-SAW

About 150 pieces. Size $15\frac{3}{4}$ in. $\times 11\frac{1}{4}$ in.

Price 2/6, postage 6d.

Amusement and propaganda combined.

"Piece the pieces and help the peace movement."

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION (INC.)
142, HIGH HOLBORN, LONDON, W.C.1.

THE ESPERANTO STUDENT

Hon. Redaktoro : W. SEVERN.

PARALLEL TRANSLATION

Oh, that ride ! That first ride ! Most truly it was an epoch in my existence ; and I still look back to it with feelings of longing and regret.

People may talk of first love—it is a very agreeable event, I dare say—but give me the flush, and triumph, and glorious sweat of a first ride like mine.

My whole frame was shaken, it is true ; and during one long week I could scarcely move foot or hand ; but what of that ?

By that one trial I had become free, as I may say, of the whole equine species.

No more fatigue, no more stiffness of joints, after that first ride.

GEORGE BORROW.

Ho, tiu rajdo ! Tiu unua rajdo ! Plej vere ĝi estis epoko en mia ekzistado, kaj mi ankoraŭ rerigardas al ĝi kun sentoj de sapiro kaj bedaŭro.

Oni priparolas la unuan enamigon—kredeble tio estas agrabla fariĝo—sed mi havu la ekruĝigon, la triumfon kaj gloran ŝvitadon de unua rajdo, simila al mia.

Mia tuta ostaro ricevis skuadon, estas vere ; kaj en la daŭro de unu longa semajno mi apenaŭ povis movi piedon aŭ manon ; sed ĉu gravas ?

Per tiu unu provo mi fariĝis kvazaŭ privilegiulo de la tuta ĉevala speco. Nenia laciĝo plu, nenia plua rigidigo de la artikoj, post tiu unua rajdo.

GEORGE BORROW.

LA FAJRO, LA AKVO, KAJ LA HONORO

(Fabelo de Gaspard Gozzi)

La fajro, la akvo, kaj la honoro iam faris kuniĝon.

La fajro neniam povas restadi en unu loko, kaj ankaŭ la akvo sin movas.

Pušate do de sia inklinio, ambaŭ decidigis la honoron, ke ĝi vojaĝu kune kun ili.

Antaŭ ol ekiri, ĉiuj tri opiniis, ke bezonas konsentiĝi pri signo por retrovi sin, se iam ili disiĝus kaj perdiĝus, unu for de la aliaj. La fajro diris, "Se al mi okazos tio, kaj se mi disiĝos de vi, atentu pri loko, kie vi vidas fumon ; ĝi estas mia signo, kaj tie vi certe trovos min."

"Pri mi," diris la akvo, "se vi ne vidos min, ne serĉu tie, kie la tero estas seka kaj fendita ; sed kie vi vidas salikojn, alnojn, kanojn, kaj herbon tre altan kaj verdan, iru tien por serĉi min ; tie mi estos."

"Koncerne min," diris la honoro, malfermu large la okulojn kaj rigardu atente sur min ; ĉar, se malbona sorto min kondukos ekster la vojo, kaj se mi perdiĝos unu fojon, vi neniam plu retrovos min."

SAMUEL MEYER.
(*El Esperantaj Perleroj*).

Kion oni povas havi en malplena poŝo ?

FABLO DE EZOPO.

Ĉiuj bestoj renkontiĝis ĉe festeto kaj komencis fanfaroni pri siaj familioj.

Al la leonino oni demandis, "Kiom da idoj vi naskis je unu fojo ?"

"Nur unu," ŝi respondis, "sed *tiu estis leono.*" (Ne kvanto, sed kvalito, decidas pri merito).

"Estas malsanige kisi bestojn, ĉu ne ?"

"Certe. Mia onklino kisis sian hundeton, kaj ĝi mortis."

Vizitanto : "Kial vi ploras ?"

Cirkano : "La elefanto mortis."

Vizitanto : "Ĉu vi do ĝin tiel amis ?"

Cirkano : "Tute ne. Sed estos mia tasko enterigi ĝin."

Competitions for Boys & Girls

The series is now closed. Final results will be announced in our next issue.

RESULT

(*Eighth Competition*)

Prize Winner : Horace Bradley (Worcester).

Special Mention : R. Carter, I. Deakin, J. Pitts, A. Richards, V. Thomas.

Honours List : A. Boffey, E. Davis, G. Graham, A. Hirschfield, J. Sanders, A. Spenser.

SMALL ANNOUNCEMENTS

(1d. per word. Minimum 1/- per issue. Prepaid)
Copy must be received at our offices by the 6th of the month for insertion in the next issue.

Bournemouth. Food Reform Guest House. Loughtonhurst, West Cliff Gardens. For a comfortable holiday or a complete rest. From 49/-. Apply, Manager.

64-page book about herbs and how to use them. Send 2d. for one and cure yourself. Trimmells, The Herbalists, 144 Richmond Road, Cardiff.

Stamps bought and sold—free price-lists. Poštmarkoj—prezlistoj senpage. W. M. Appleby, Clarence Street, Cheltenham, England.

Hotel Metropole, rue Eglise, Ostend. Leading second-class English hotel, 75 comfortable bedrooms, hot and cold running water, lift, lounge, garage. Special terms for Esperantists. Apply Manager.

Interesaj Fotografaj poštarkoj pri vivo en Norda Borneo estas trezoro por kolektistoj tutmonde. Tom Jones, 54 Lake Road, Portsmouth, sendos al vi sortimenton po ses pencoj por ĉiu karto, afankite.

Barry. — Furnished house to let. August: 4 bedrooms, 2 reception, convenient. 61, Porthkerry Road.

Kursarangantoj! Ĉi tie estas sveda rajtigita Ĉe-metoda instruisto, kiu ŝerĉas kursanojn. Redaktoro E. Juneby, Jönköping, Svedujo.

La Logio, 109 Kungsholmen (I.O.G.T.) aranĝas esperantan vesperon la 30 Aŭgusto 1933; Ni esperas ricevi multe da leteroj el Anglujo de anglaj bontemplanaj Esperantistoj. Adresu: S-ro Ludvig L. Landin, Alströmergatan 32, IX, Stockholm, Svedujo.

Gazetkolektantoj atentu! Plenan kolekton de la gazetoj The Esperantist, The British Esperantist, International Language, Literaturo (sen n-ro 1), jarkolektojn de The Esperanto Monthly 1913-19, 200 jarkolektojn, 10,000 diversajn numerojn, ni vendas al la plej multe proponanto. Sendu prezproponon kaj eventuale manklistoj de aliaj gazetoj. Plenan liston ni sendas prunte por 2 respondkuponoj. Literatura Mondo, Hungarujo, Budapest IX, Mester-u. 53.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi revuojn kaj librojn F-ino E. Švedova, Moskvo 61, Hromova 39, Sovetunio.

Du amikinoj gastigas libertempulojn, urbo kaj ĉirkaŭajo, en domo aŭ subtendo. Skribu al S-ino M. Sampson, 48 Windsor Road, Torquay.

Libertempo en Malo-les-Bains apud Dunkirko, Norda Francujo. Familio akceptus gastojn. Loĝejo je 50 pašoj de la marbordo. Petu sciigojn de S-ino Pessey, 56 Avenue About. Esperanto parolata.

Japanaj geknaboj volas korespondi kun vi. Sciigu vian adreson al mi; mi sendos al vi belan poštarkon kaj transdonos vian adreson al miaj geknaboj. Ili ankaŭ tuj skribos al vi per diversaj poštarkoj ilustritaj. Mia adreso: S-ro J. Ogasaŭara, Tojohara-čo, Ŭakajama-ši, Japanujo.

S.A.T. Group extends a hearty welcome to all Esperantists and beginners. 8-10 p.m., every Saturday, 144 High Holborn (Top Floor), entrance in Silver Street.

Read how Esperanto is **Used** in the Labour Movement in "Ruĝa Esperantisto," organ of British Labour Esperanto Association. 1½d. monthly, 1/6 year, post free. Sec. Smith, 36 Womersley Rd., N.8.

THE BRITISH ESPERANTIST

Telegrams: EDITORIAL, ADVERTISEMENT AND PUBLISHING OFFICES: Telephone: ESPERANTO, 142 HIGH HOLBORN, LONDON, W.C.1. HOLBORN 4794. WESTCENT, LONDON. Editor: M. C. BUTLER.

RATES OF SUBSCRIPTION (including postage to any part of the world)—Twelve months, 2/6. Single copies, Three Penny Stamps. (Free to B.E.A. members).

JARABONO: 3 svisaj frankoj. Unuopaj ekzempleroj: po 30 centimoj (respondkupono de U.E.A.). Oni sendu manuskriptojn al la Redaktisto. La Redaktisto resendos nur tiujn manuskriptojn, kiujn akompanas afankita koverto, aŭ respondkupono. Li rezervas la rajton fari korektojn laŭbezono.

MANUSCRIPTS should be typewritten, and be addressed to THE EDITOR. Although care will be taken to return rejected manuscripts, the Editor does not hold himself responsible for loss or damage, nor does he undertake to return manuscripts unaccompanied by a stamped addressed envelope. He is not necessarily in agreement with views expressed in signed articles, but accepts responsibility for those unsigned.

ADVERTISEMENT RATES will be quoted on application to the Business Manager.

THE BRITISH ESPERANTO ASSOCIATION consists of Fellows, Members, Patrons, Affiliated Groups, and Federations. The Annual Subscriptions are:—Fellows, 21/-; Members, 5/-; Junior Members (under 18), 2/6; Patrons, £1 1s. od.; Life Fellowship, £12 12s. od.; Life Membership, £5.